

Per leksikono tia, kia estas skizita supre, esperantisto povus eltrovi kiajn objektojn agverbo povas havi, kaj kiaj objektoj de aktiva verbo povas esti la subjekto de tiu verbo pasivigita. Tiu aldona informo estus tre utila kaj evitus la problemojn de svagaj gramatikaj modeloj.

## Referencoj

- Butler Montague C. (1967): *Esperanto-English Dictionary*, BEA.
- Garcia Blázquez Felix (1988-1990): Problemoj ĉe la klasifo de verboj. Akademijaj Studoj, paĝoj 301-7, *Esperanto Press*, Bailieboro, Ontario, Kanado.
- Jordan David K. (1992): *Being Colloquial in Esperanto*, University Press of America, Inc.
- Kiselman Christer O. (1995): Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto, en "La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto" (red. Petr Chrdle), paĝoj 24-40, *Dobřichovice: Kava-Pech*, ISBN 80-85853-08-6.
- Mattos Geraldo, Semantiko kaj leksikografio, [esperanto.org/Ondo/L-matos1.htm](http://esperanto.org/Ondo/L-matos1.htm)
- NPIV: Duc Goninaz Michel (2002; 2005): La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, SAT.
- PIV: Waringhien G. (1970): Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, SAT.
- PMEG: Wennnergren Bertil (2005): Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko.
- PV: Grosjean-Maupin E. (1934, 1971): Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento, SAT.
- Schubert Klaus, [http://ourworld.compuserve.com/Homepages/profcon/e\\_dlt2.htm](http://ourworld.compuserve.com/Homepages/profcon/e_dlt2.htm)

## Adreso de la aŭtoro

D-ro Donald E. ROGERS  
47 Trafalgar St.  
Lower Hutt  
Nov-Zelando 5011

<don-cles@ihug.co.nz>

## Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas komputisto, sed dum multaj jaroj li estis esplora kemiisto. Li multe verkas en Esperanto kaj tradukas el kaj en Esperanto. Li estas kunaŭtoro, kun *Doug Portmann*, de "Kemia kaj Scienc-Teknika Vortaro", eldonita de *D.P.* en 1993.

## Perceptita simileco de parolsonoj de Esperanto kaj aliaj kvar lingvoj ĉe japanlingvanoj

Hiroshi NAGATA

### Resumo

Tiu ĉi studo esploris, ĉu japanlingvanoj perceptas parolsonojn de ses lingvoj (la angla, la nederlanda, la franca, la itala, la japana kaj Esperanto) konforme al la diagramo prezentita de *Ramus* kaj aliaj (1999). Sesdek-unu partoprenantoj juĝis similecon kaj de unuopaj parolsonoj kaj de sinsekvo de parolsonoj de la lingvoj. Ili ankaŭ juĝis la lingvojn pri tri aspektoj de ties parolsonoj: nombro de vokaloj, aroj de konsonantoj kaj aŭskultebleco. Analizo de grupigo de la ses lingvoj montris, ke la japanlingvanoj perceptas la ses lingvojn ne konforme al la diagramo. Ili anstataŭe perceptis la parolsonojn de la franca kaj la nederlanda kiel similajn unuflanke, kaj la parolsonojn de la angla kaj la itala kiel similajn aliflanke. Ili samtempe perceptis Esperanton kiel similan al la angla kaj la itala, kaj juĝis ĝin tiel aŭskultebla kiel la angla. Tamen, la japanlingvanoj perceptis la parolsonojn de la japana plej malproksime de aliaj kvin lingvoj. Trovaĵoj sugestas, ke la japanlingvanoj perceptas la similecon inter la ses lingvoj plejparte surbaze de aŭskultebleco de la parolsonoj.

### Enkonduko

*Nagata* (2004) esploris, ĉu japanlingvanoj perceptis parolsonojn de Esperanto kiel similajn al tiuj de la japana kaj rilate al unuopaj parolsonoj kaj rilate al la sinsekvo de ili. Li trovis, ke tio validas almenaŭ koncerne perceptadon de unuopaj parolsonoj. Specife, la japanlingvanoj, post kelkfoja aŭskultado de la unuopaj parolsonoj de Esperanto, juĝis ilin kiel similajn al tiuj de la japana. Plue, ili ankaŭ juĝis, ree post kelkfoja aŭskultado, la unuopajn parolsonojn de Esperanto kiel facile aŭskulteblajn. Tiuj ĉi trovaĵoj ne estis observitaj pri aliaj

lingvoj testitaj kiel la angla, la franca, la itala kaj la nederlanda. La trovaĵoj sekve sugestas, ke parolsonoĵ de Esperanto estas iom facile akordiĝemaj kun tiuj de la japana. La supra esploro estis farita unuflanke surbaze de trovaĵoj kiujn raportis *Ramus, Nespor & Mehler* (1999) kaj aliflanke konsidere de la rolo de du Esperantaj finaĵoj, kiuj verŝajne plenumas grandan rolon en la perceptado de Esperantaj parolsonoĵ, nome: “n” kiel indikilo de akuzativo kaj “j” kiel indikilo de plureco.

*Ramus* kaj aliaj (1999) analizis la distribuojn de tempodaŭro de vokaloj kaj konsonantoj ene de parolsonoĵ eltiritaj el ok malsamaj lingvoj. La distribuojn ili karakterizis per du variantoj, %V kaj  $\Delta C$ , kiuj indikas, respektive, la proporcio de tempodaŭro por vokaloj ene de frazoj kaj la variancan devion de tempodaŭro por konsonantoj ene de ili. Analizo grupigis la ok lingvojn en tri grupojn.

La unua grupo konsistanta el la angla, la pola kaj la nederlanda havis pli malgrandan valoron de %V kaj pli grandan valoron de  $\Delta C$  ol la dua grupo, kiu inkludas nur unu lingvon, la japanan. La lasta grupo kun kvar lingvoj (la hispana, la itala, la franca kaj la kataluna) lokas sin inter la aliajn du grupojn sed iom proksime al la unua grupo. Tiela grupigo de la ok lingvoj aspektas plej interese, kiam oni sciiĝas ke la tri grupoj estas iom korelativaj kun tri tipoj de maniero, en kiu lingvanoj perceptas parolsonoĵn, nome: perceptado per silaboj, perceptado per moraoj kaj perceptado per akcentata ritmo. Lingvanoj, kiuj denaske akiris la unuan grupon de lingvoj, perceptas parolsonoĵn surbaze de akcentata ritmo; tiuj lingvanoj, kiuj denaske akiris la duan, perceptas ilin surbaze de moraoj; kaj tiuj, kiuj akiris la trian, perceptas ilin surbaze de silaboj.<sup>(1)</sup>

*Nagata* (2001, 2004) rezonis, ke Esperanto, se vidate laŭ perceptadomaniero, proksimiĝus al la japana kiel lingvo perceptata surbaze de moraoj. Tio ĉi estas unuflanke pro intuicio, ke Esperanto sonas kvazaŭ la itala (*Privat*, 1957; *Corsetti*, persona komunikaĵo<sup>(2)</sup>) kaj aliflanke pro intuicio, ke ĝi havas du distingajn finaĵojn supre menciitajn. La unua intuicio indikas, ke Esperanto similas parolsonoĵ al la tria grupo de latinidaj lingvoj kies parolsonoĵ estas prilaborataj surbaze de silaboj. La dua intuicio estas tuj akceptebla al parolantoj de Esperanto, ĉar la du finaĵoj donas al la lingvo karakterizan ritmon de ties parolsonoĵ. Plue, ĉar la finaĵoj estas ambaŭ konsonantoj, ili tial povus roli kiel moraoj, almenaŭ por japanlingvanoj. Tiuj ĉi du intuicioj do sugestas, ke Esperantaj parolsonoĵ perceptitaj disiĝus de la silabo-bazitaj lingvoj kaj alproksimiĝus al la japana, morao-bazita lingvo.

La supraĵ trovaĵoj indikas, ke Esperantaj parolsonoĵ perceptis japanlingvanoj kiel similajn al tiuj de la japana, ili tamen ne montras kiamaniere la japanlingvanoj perceptas parolsonoĵn de Esperanto se ties parolsonoĵ estas metitaj kontraŭ tiuj de aliaj lingvoj. Tiu ĉi esploro sin turnas pli rekte al tiu ĉi problemo kaj celas determini ĉu la japanlingvanoj efektive perceptas parolsonoĵn de Esperanto kiel pli similajn al tiuj de la japana ol tiujn de aliaj lingvoj. En tiu ĉi esploro, ni prezentos al japanlingvanoj parolsonoĵn de ses lingvoj inkluzive Esperanton kaj postulos al ili juĝi la similecon inter ĉiuj eblaj paroj de du lingvoj eltiritaj el la ses lingvoj. Ni poste grupigos, per analizo de grupigo (angle: *cluster analysis*), la ses lingvojn surbaze de perceptita simileco. Krome, la japanlingvanoj ankaŭ juĝos la ses lingvojn unu post la alia, ĉi-okaze rilate al tri trajtoj de la parolsonoĵ, nombro de vokaloj, aroj de konsonantoj kaj aŭskultebleco. La donitaĵoj akirotaj pri tiuj ĉi trajtoj liveros al ni informojn por bone kompreni la naturon de la grupigo akirotajn pere de analizo de grupigo. Tiu ĉi studo do celas plicertigi, ĉu perceptita Esperanto lokalizos sin parolsonoĵ inter la silabo-bazitaj lingvoj latinidaj kiel la franca kaj la itala unuflanke kaj la morao-bazita lingvo kiel la japana aliflanke. Pli specife, ĝi esploras, ĉu la analizo de grupigo montros, ke Esperanto grupiĝas parte kun la latinidaj lingvoj kaj parte kun la japana.

## Metodo

### Partoprenantoj

Partoprenis 61 studentoj (45 virinoj kaj 16 viroj; meza aĝo = 20,2) de *Kawasaki University of Medical Welfare*. Ili ĉiuj estis denaskaj parolantoj de la japana.

### Stimulaj materialoj

Stimulaj parolsonoĵ venis el ses lingvoj, kiuj estis uzitaj en *Nagata* (2004), nome: la angla kaj la nederlanda kiel lingvoj kun akcentata ritmo, la franca kaj la itala kiel silabo-bazitaj lingvoj, la japana kiel morao-bazita lingvo, kaj Esperanto. Vidu *Nagata* (2004) pri la trajtoj de la parolsonoĵ por la kvin lingvoj escepte de la japana. Preskaŭ egalaj estis rapidoj de parolsonoĵ inter la kvin lingvoj, kiam oni difinis rapidon kiel daŭron de parolsonoĵ dividitajn per la nombro de silaboj ene de la parolsonoĵ: la angla (0,22), la nederlanda (0,26), la franca

(0,24), la itala (0,20), kaj Esperanto (0,23). Trajtoj de la japana estis: daŭro de parolsonoj (15.63 sekundoj), nombro de silaboj ene de ili (89), kaj rapido (0,18), kvankam trajtoj tiuj ĉi estis ne signifaj pro tio, ke la japana estis denaska por la partoprenantoj en tiu ĉi studo, sekve rapido ne tiom gravas kiom ĝi rolas ĉe la ceteraj fremdaj lingvoj.

### Procedo

La partoprenantoj ricevis la parolsonojn en klasĉambro pere de MD (mini-disko)-aparato. La prezentado de la stimulaj materialoj konsistis el du testfazoj.

En la unua testfazo la partoprenantoj aŭskultis dek-kvin parojn da lingvoj kombinite eltiritajn el la ses lingvoj. La ordo de du lingvoj pare aperantaj aŭ unuavice aŭ duavice estis tiel determinita ke ĉiu lingvo aperu aŭ unuavice aŭ duavice laŭeble plej ofte tra la listo de dek-kvin paroj da lingvoj. Plue, la listo estis tiel konstruita ke ĉiu lingvo aperu laŭeble disigite de aliaj lingvoj tra la listo. En tiu ĉi fazo, la partoprenantoj juĝis la similecon inter la du lingvoj parigitaj rilate al du trajtoj de parolsonoj: (1) simileco je unuopaj parolsonoj kaj (2) simileco je sinsekvo de parolsonoj. Ili juĝis la similecon de la 15 paroj da lingvoj sur 7-poenta-skalo kun indikiloj donitaj "tute simila" al 7 poentoj kaj "tute ne simila" al 1 poento. Ili donis poentojn de 1 ĝis 7, laŭgrade de perceptita simileco de la parolsonoj.<sup>(3)</sup>

En la dua testfazo la partoprenantoj juĝis ĉiun lingvon unu post la alia, ree sur la 7-poenta-skalo. Tamen, ĉi-okaze, estis indikita poento 7 kiel "tute jes" kaj poento 1 kiel "tute ne", rilate al tri trajtoj sekvan- taj: (1) vokaloj (a, e, i, o, u, ktp) de tiu ĉi lingvo estas facile aŭskult- eblaj; (2) tiu ĉi lingvo ŝajnas inkluzivi multajn arojn de konsonantoj; kaj (3) tiu ĉi lingvo estas facile aŭskultebla. La ordo de prezentado de la ses lingvoj estis hazarde decidita.

### Rezultoj

Ni prezentas unue la rezultojn akiritajn en la dua testfazo por ke ili estu rilatigeblaj al la rezultoj akiritaj en la unua testfazo. Tabelo 1 donas mezvalorojn kun respektivaj variancaj devioj (angle: *SD*). Ni aplikis analizon de varianco (angle: *analysis of variance*) kun 6 nive- loj (lingvoj: la angla, la nederlanda, la franca, la itala, Esperanto kaj la japana), en kiu la varianco de la lingvoj estis traktita kiel ripetita

mezuro (angle: *repeated measure*). La diferencoj inter du mezvaloroj estis komparitaj pere de *Tukey HSD* - testo ( $p < 0,05$ ).

	angla	neder-landa	franca	itala	Espe- ranto	japana
(1) Mezo	4.59	3.13	2.56	3.49	4.26	6.26
SD	1.43	1.23	1.03	1.50	1.50	1.16
(2) Mezo	4.34	4.56	4.80	4.39	4.44	3.18
SD	1.27	1.40	1.52	1.56	1.28	1.71
(3) Mezo	5.23	3.26	2.30	3.39	4.30	6.72
SD	1.35	1.54	1.11	1.62	1.65	0.83

Tabelo 1: Mezvaloroj kaj SD pri tri malsamaj juĝadoj por ses lingvoj

(1) : Vokaloj de tiu ĉi lingvo estas facile aŭskulteblaj

(2) : Tiu ĉi lingvo ŝajnas inkluzivi multajn arojn de konsonantoj

(3) : Tiu ĉi lingvo estas facile aŭskultebla

### Perceptitaj trajtoj de unuopaj lingvoj

#### Vokaloj facile aŭskulteblaj

La analizo montris statistike signifikan valoron,  $F(5, 300) = 65,67$ ,  $p < 0,001$ . Plej facile kaj statistike signifike aŭskulteblaj estis voka- loj de la japana kompare kun la ceteraj kvin lingvoj. Ne troviĝis sig- nifika diferenco inter la angla kaj Esperanto, kiuj ambaŭ estis pli facile aŭskulteblaj ol tri lingvoj, la nederlanda, la itala kaj la franca. La vokaloj de la itala estis pli facile aŭskulteblaj ol tiuj de la franca, kvankam ne troviĝis diferenco inter la nederlanda kaj la franca. Plej malfacile aŭskulteblaj estis la vokaloj de la franca.

#### Perceptita multeco de aroj da konsonantoj

La kvin lingvoj fremdaj al japanlingvanoj estis senescepte rigarditaj kiel enhavantaj pli multajn arojn de konsonantoj ol la japana,  $F(5,300) = 9,95$ ,  $p < 0,001$ . Ne troviĝis signifika diferenco inter ajnaj paroj el la kvin fremdaj lingvoj.

#### Perceptita facileco de aŭskultado de lingvoj

Esperanto formis grupon kun la itala. Kaj en la tria etaĝo aliĝis la angla al la grupo de tiuj ĉi du lingvoj, Esperanto kaj la itala. La ana- lizo montris signifikan valoron,  $F(5, 300) = 103,77$ ,  $p < 0,001$ . La japana ree estis pli facile aŭskultebla ol la ceteraj kvin lingvoj. Sekvis


la angla, kiu estis perceptita kiel pli facile aŭskultebla ol Esperanto, la nederlanda, la itala kaj la franca. Inter la lastaj kvar lingvoj Esperanto estis pli facile aŭskultebla ol la ceteraj tri. La franca estis pli malfacile aŭskultebla ol la nederlanda kaj la itala.

### Perceptita simileco inter la ses lingvoj

Analizo de grupigo estis aplikita por analizi la perceptitan similecon inter la ses lingvoj. Ni tamen plenumis aktualajn analizojn sur la matricojn de nesimileco, kiuj estis kalkulitaj pere de transformado de la matricoj de simileco.

### Perceptita simileco de unuopaj parolsonoj


Bildo 1 prezentas arbo-diagramon akiritan per aplikado de la *Ward*-metodo, unu el la metodoj de analizo de grupigo. Esperanto kaj la angla unue formis grupon, dum la franca kaj la nederlanda formis due grupon tute apartan. La kunligo-distanco (angle: *linkage distance*) inter la du lingvoj en la unua grupo estis preskaŭ egala al tiu inter la du lingvoj en la dua grupo. La itala grupiĝis kun la grupo de Esperanto kaj la angla. En la kvara etaĝo, tiuj ĉi kvin lingvoj formis unu grupon grandan, al kiu grupiĝis la japana fine kaj kun iom da distanco inter si kaj la aliaj kvin lingvoj.



**Bildo 1.** Arbo-diagramo por perceptita simileco de unuopaj parolsonoj (Analizo de grupigo: *Ward*-metodo)

### Perceptita simileco de sinsekvo de parolsonoj

Bildo 2 montras arbo-diagramon akiritan per la sama metodo. Same kiel la perceptita simileco de unuopaj parolsonoj, la franca kaj la nederlanda formis unu grupon en la dua etaĝo. Tamen, antaŭ ĉio, Esperanto formis grupon kun la itala. Kaj en la tria etaĝo aliĝis la angla al la grupo de tiuj ĉi du lingvoj, Esperanto kaj la itala. Tiuj ĉi du apartaj grupoj grupigis sin reciproke en la kvara etaĝo, kun, ree, proksima distanco inter si. La japana grupiĝis fine kun la tiel ĉi formita granda grupo, izolite kun iom da distanco de la grupo.



**Bildo 2.** Arbo-diagramo por perceptita simileco de sinsekvo de parolsonoj (Analizo de grupigo: *Ward*-metodo)

### Diskuto

La trovaĵoj akiritaj ne subtenis la prognozon, ke rilate al la perceptita simileco de parolsonoj japanlingvanoj grupigos Esperanton iom parte kun la japana kaj iom parte kun la du latinidaj lingvoj, la itala kaj la franca. Kontraŭe, Esperanto unue grupiĝis unuflanke kun la angla pri perceptita simileco de unuopaj parolsonoj kaj aliflanke kun la itala pri perceptita simileco de sinsekvo de parolsonoj. Tiuj ĉi grupiĝoj ambaŭ okazis plej rapide, alifraze: Esperanto lokalizis sin proksime al la respektiva lingvo, la angla aŭ la itala. La japana, tutkontraste, grupiĝis kun la aliaj kvin lingvoj plej prokraste, nur post kiam

grupiĝo de la ceteraj kvin lingvoj plene plenumiĝis. Tiu ĉi prokrasta grupiĝo okazis sammaniere sendepende de du juĝadoj de simileco, simileco de unuopaj parolsonoj kaj simileco de la sinsekvo de ili.

La supraj trovaĵoj sugestas, ke japanlingvanoj juĝis la similecon de parolsonoj ne konforme al la diagramo prezentita fare de *Ramus* kaj aliaj (1999), tiu diagramo kiu plejparte akordiĝas kun la tri perceptado-manieroj. Kiel, do, oni klarigu la trovaĵojn? Ebla strategio, kiun la partoprenantoj alprenis en siaj juĝadoj, estas multe pli simpla, nome: kiomgrade iuj aŭ aliaj parolsonoj kaj/aŭ ties sinsekvoj estas aŭskulteblaj. Tiu ĉi interpretado devenas de tri kialoj sekvantaj.

Unue, tiu interpretado klarigus la grupiĝon de du lingvoj, la franca kaj la nederlanda. Specife, tiuj ĉi du lingvoj grupiĝis plej frue kun si reciproke kaj rilate al perceptita simileco de unuopaj parolsonoj kaj rilate al la perceptita simileco de sinsekvo de ili, senrilate al la perceptado-manieroj. Krome, ambaŭ lingvoj estis traktitaj kiel samaj en la senco, ke ili unuflanke havas multe malpli da vokaloj kaj ke ili aliflanke estas multe malpli aŭskulteblaj ol la japana (vd. Tabelon 1). Tiu-rilate, ŝajnas, ke ambaŭ lingvoj estis perceptitaj tiamaniere, ke ili parolsone estas pli malsamaj – tial malpli aŭskulteblaj – ol la japana kontraste kun la aliaj tri lingvoj, la angla, la itala kaj Esperanto, kvankam fremdaj estas la lastaj tri lingvoj al la japanlingvanoj. Ŝajnas do, ke frua grupiĝo de la franca kaj la nederlanda okazis surbaze de ties malfacila aŭskultebleco.

Due, tiu interpretado klarigus la grupiĝon de du lingvoj, la angla kaj Esperanto. La angla kaj Esperanto, unuflanke, grupiĝis plej frue rilate al perceptita simileco de unuopaj parolsonoj, malgraŭ ke la angla, laŭ *Ramus* kaj aliaj (1999), estas la lingvo, kiu lokiĝas laŭsone plej malproksime de la japana. Ambaŭ lingvoj, aliflanke, estis traktitaj kiel pli facile aŭskulteblaj ol la aliaj tri fremdaj lingvoj, la itala, la nederlanda kaj la franca, malgraŭ ke Esperanto estis tute fremda al la aktualaj japanaj partoprenantoj, dum la angla estis bone konata al ili, almenaŭ parolsone. Tio ĉi ĉio estus klarigebla, se ni interpretu, ke Esperanto estas la lingvo kies parolsonoj estas pli aŭskulteblaj al la japanlingvanoj ol tiuj de la ceteraj lingvoj escepte de la angla. Aliĝo de la itala al la grupo de tiuj ĉi du lingvoj estas konforma al la mencio (*Privat*, 1957; *Corsetti*, persona komunikado), ke ekzistas simileco de parolsonoj inter la itala kaj Esperanto. Tio ĉi signifas, ke por japanlingvanoj la itala estas la lingvo kies parolsonoj estas tiel facile

aŭskulteblaj kiel tiuj de Esperanto. Ŝajnas do, ke la grupiĝo de tri lingvoj, la angla, Esperanto kaj la itala, estis plenumita surbaze de ties facila aŭskultebleco. Notu, tamen, ke ĉi tiea facileco devenas de du malsamaj fontoj. La angla estas facila pro tio, ke la japanlingvanoj spertis aŭskulti ties parolsonojn, dum Esperanto kaj la itala estas facilaj pro tio, ke ili estas parolsone aŭskulteblaj.

Laste, tiu interpretado klarigus la grandan kunligo-distancon inter la japana, denaska al japanlingvanoj, kaj la ceteraj kvin lingvoj, fremdaj al ili. Notu, ke konforme al tio ĉi, la lastaj kvin lingvoj, kiel Bildo 1 kaj Bildo 2 ilustras, ĉiuj grupiĝis kun malpli da kunligo-distanco (malpli da distanco de ĉ. 4,5 por la perceptita simileco de sinsekvo de parolsonoj kaj pli da distanco de ĉ. 5,0 por perceptita simileco de unuopaj parolsonoj). Tio sugestas, ke la kvin lingvoj, aparte ties karakterizaj trajtoj de parolsonoj, estis ĉiuj perceptitaj kiel malsamaj ol tiuj de la japana, tial fremdaj al la oreloj de japanlingvanoj. Vidu Tabelon 1, kiu montras, ke la kvin fremdaj lingvoj estas perceptitaj kiel lingvoj, kiuj inkluzivas multajn arojn de konsonantoj. Ĉi-rilate, fremdeco estus plua faktoro, kiu estus produktinta la rezulton, ke la japana estis perceptita tute malsame ol la ceteraj lingvoj, kvankam la faktoro de fremdeco estas grandparte korelativa kun aŭskultebleco.

Resume, la metodo de grupigo ne grupigis Esperanton en la grupon antaŭdiritan surbaze de du intuicioj, nome la intuicio laŭ *Ramus* kaj aliaj (1999) kaj la intuicio pri la du Esperantaj finaĵoj de j kaj n. La trovaĵoj estus klarigeblaj pli simplamaniere plejparte per aŭskultebleco de parolsonoj. Kompreneble rezultos aliaj trovaĵoj ol la kuranĵoj, se oni utiligus lingvanojn aliajn ol japanlingvanojn. Tio ĉi aparte validus, se fremdeco estus la koncerna faktoro kiel supre menciite. Ĉiu-okaze, tamen, tiu ĉi esploro montris, ke Esperanto estas sendube la lingvo kies parolsonojn perceptas japanlingvanoj kiel facile aŭskulteblajn, kvankam ĝi estas tute fremda al ili.

## Referencoj

- Clark HH & Card SK (1969) *Role of semantics in remembering comparative sentences.* *Journal of Experimental Psychology*, 82, 545-553
- Clark HH, Carpenter PA & Just MA (1973) *On the meeting of semantics and perception.* en WG Chase (red.): *Visual information processing* (pp. 311-381), New York: Wiley
- Clark HH & Clark EV (1977) *Psychology and language: An introduction to psycholinguistics.* New York: Harcourt Brace Jovanovich

- Cutler A, Mehler J, Norris D & Segui J (1983) *A language-specific comprehension strategy*. *Nature*, 304, 159-160
- Cutler A, Mehler J, Norris D & Segui J (1986) *The syllable's differing role in the segmentation of French and English*. *Journal of Memory and Language*, 25, 385-400
- Cutler A, Mehler J, Norris D & Segui J (1989) *Limits on bilingualism*. *Nature*, 340, 229-230
- Mehler J, Dommergues J & Frauenfelder U (1981) *The syllable's role in speech segmentation*. *Journal of Verbal Learning and Verbal Behavior*, 20, 298-305
- Nagata H (2001) *Diferencoj inter lingvoj konsideritaj el la vidpunkto de perceptado de parolsonoj*. *La Harmonio*, n-ro 187, 4-9
- Nagata H (2004) *Esperantaj parolsonoj perceptitaj de japanlingvanoj*. *Scienca Revuo*, 55, 13-24
- Otake T, Hatano G, Cutler A & Mehler J (1993) *Mora or syllable? Speech segmentation in Japanese*. *Journal of Memory and Language*, 32, 258-278
- Privat E (1957) *Esprimo de sentoj en Esperanto*. 3-a eldono. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto.
- Ramus F, Nespor K & Mehler J (1999) *Correlations of linguistic rhythm in the speech signal*. *Cognition*, 73, 265-292

## Notoj

- (1) Rilate al la tri perceptado-manieroj de parolsonoj, vd., ekzemple, *Cutler, Mehler, Norris & Segui* (1983, 1986, 1989), *Mehler, Dommergues & Frauenfelder* (1981), *Otake, Hatano, Cutler & Mehler* (1993).
- (2) Koncerne similecon de parolsonoj inter Esperanto kaj la itala, *Renato Corsetti* (persona komunikaĵo, la 22-an de julio, 2002) indikis, ke "efektive ĝi (Esperanto) sonas kiel la itala se oni forprenas de la itala la longecon de la vokaloj."
- (3) Tio ĉi estas pro tio, ke juĝado pri simileco estas psiĥolingvistike pli senĝena kaj tial pli facila ol juĝado pri nesimileco kiu entenas en si negativan morfemon ne (vd. *Clark & Card*, 1969; *Clark, Carpenter & Just*, 1973; *Clark & Clark*, 1977, pri tiu ĉi problemo). Analizo de grupigo, tamen, estos plunumita sur la matricon de nesimileco.

## Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA  
 Department of Clinical Psychology  
 Kawasaki University of Medical Welfare  
 288 Matsushima, Kurashiki 701-0193  
 JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

## Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

## Moskvanoj kaj francoj (laŭ la verkaro de I. S. Ŝmelev)

Nikolajevna Afinskaja ZOJA

En la rusa literaturo ne estas alia verkisto, kiu same bone priskribus la ĉiutagan vivon de Moskvo de la fino de la 19-a / komenco de la 20-a jarcento, kiel I. S. Ŝmelev (Ŝmelevo). En liaj prozaj verkoj aperas la tuta universo de moskvanoj – komercistoj, etburĝoj, laboristoj de ĉiuj specialaĵoj, kaj same preĝemuloj, almonzpetuloj – sen ili ja ne eblas! – homoj el diversaj sociaj tavoloj, kunigitaj en la sama loko de Rusio, nomataj moskvanoj.

Povas ŝajni strange, ke la parolado de tiuj homoj, moskvanoj, herojoj de verkoj de Ŝmelevo, enhavas ne nur rusajn vortojn: en ĝi ofte sonas nerusaj, plejparte francdevenaj vortoj. Tio starigas multajn demandojn. Kiuj estas la specifecoj de la uzo de tiuj vortoj en lia verkaro? Kial "franca akĉento" de ŝmelevaj moskvanoj ne ŝajnas fremda, sed inverse – donas al liaj verkoj "la liberon kaj forton", pri kiuj parolis samtempuloj de Ŝmelevo? La verkisto Ivan Ŝmelev bone konis la francan kulturon. Liaj plej ŝatataj verkistoj estis francoj: Jules Verne, Mariette kaj Emar – ili malfermis antaŭ la juna Ivano "belegan mondon de neatingebla". Ŝajnas ke por li la plej bonaj trajtoj de francaj herojoj kuniĝis kun liaj ideoj pri la rusaj homoj kaj rusa vivo.

Kiamaniere la knabo imagis al si la francojn? La unua franco, kiun li ekvidis, estis akrobato, kiu devis flugi per flugbalono dum Paskaj festoj en publika ĝardeno (Ŝmelevo parolas pri tio en sia rakonto "Kiel ni flugis"). Antaŭ la flugo la franco drinkis verŝeton "por kuraĝo", kiel diras rusoj, ekridis, kunfrapis la manojn... Lia flugo finiĝis malbone: la balono alkroĉiĝis sur branĉo de arbo, kaj li alteriĝis nesukcese. Kiam la mastro de la cirko venigis lin por saluti la publikon, li estis pala kaj apenaŭ povis stari. En la homamaso iu diris: "Jes, la malriĉeco devigas fari ion ajn. Estas eĉ homoj, kiuj englutas sabrojn". En tiu momento la knabo komprenis, ke brilanta vestaĵo kaj heroeca konduto estis nur malriĉeco. Sed la kuraĝaj flugoj de la franco impre-